

Heinrich Heine,  
En Majo

*tradukita de Man-  
fredo Ratislavo*

En Majo, kiam ĉiuj  
Burgonoj malfer-  
miĝis,  
La amo kiel floro  
En mia kor' estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj  
Birdetoj sin  
aŭdigis,  
Al ŝi deziron mian  
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Ger-  
mana poemo "Im  
Mai" de HEINRICH  
HEINE (\*1797-12-  
13 - †1856-02-17)  
en Esperanton de  
MANFREDO RA-  
TISLAVO (Manfred  
Retzlaff, Stettiner  
Str. 16, D-59302  
Oelde, Germanio,  
\*1938-11-04) en  
1982-11-14.*

MR-002-4 / Arg-  
203-403 (2004-04-05  
20:37:00)

*La poemo troviĝas en  
la „Libro de la kan-  
toĵ“, sekcio „Lirika  
intermezo“ (1822 -  
1823), n-ro I.*

Heinrich Heine,  
En admirinde  
bela maj'

*tradukita de Hans-  
Georg Kaiser*

En admirinde bela  
maj',  
dum jam burgonoj  
krevis,  
jen ankaŭ miakore  
la amo sin eklevis.

En admirinde bela  
maj',  
dum birdotril' senbri-  
dis,  
jen mi al ŝi sopirojn,  
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germa-  
na poemo "Im Mai"  
de HEINRICH HEINE  
(\*1797-12-13 - †1856-  
02-17) en Esperanton de  
HANS-GEORG KAISER  
(Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-203-431 (2004-03-  
24 07:33:04)

*La poemo troviĝas en la  
„Libro de la kantoĵ“, sek-  
cio „Lirika intermezo“  
(1822 - 1823), n-ro I.  
La traduko estas korekti-  
ta laŭ la lasta ŝanĝo, ki-  
un faris s-ro Hans-Georg  
Kaiser en 2004-03-21.*

Heinrich Heine,  
Im Mai

*tradukita de Man-  
fredo Ratislavo*

Im wunderschönen Monat  
Mai,  
Als alle Knospen spran-  
gen,  
Da ist in meinem Herzen  
Die Liebe aufgegangen.

Im wunderschönen Monat  
Mai,  
Als alle Vöglein sangen,  
Da hab' ich ihr gestanden  
Mein Sehnen und Verlan-  
gen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana  
poemo estas HEINRICH HEI-  
NE (\*1797-12-13 - †1856-02-  
17).*

Arg-203-402 (2004-03-24  
07:28:07)

*Das Gedicht befindet sich in  
Heinrich Heines Werk „Buch  
der Lieder“, im Abschnitt  
„Lyrisches Intermezzo“, Nr.  
I.*

Heinrich Heine,  
En la mirinda  
bela Maj'

*tradukita de Kálmán  
Kalocsay*

En la mirinda bela  
Maj',  
dum sin burgonoj  
fendis,  
en mia kor' la amon  
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela  
Maj',  
dum birda tril' ne  
ĉesis,  
al ŝi sopiron mian  
konfide mi konfesis.

*Traduko de la Ger-  
mana poemo "Im  
Mai" de HEINRICH  
HEINE (\*1797-12-  
13 - †1856-02-17)  
en Esperanton de  
KÁLMÁN KALOCSAY  
(Kalmano Kaloĉajo,  
\*1911 - †1976).*

Arg-203-1082 (2010-  
05-26 12:08:05)